

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito
Albert Schweizer, 5-a parto. Frédéric Passy
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 593, 1975.02.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro. Vi aŭdas la kvinan prelegon de tiu serio.

A.- En 1901 la unua Nobel-pacpremio rekompencis samtempe la ĝenevanon Henry Dunant, la fondinton de Ruĝa Kruco, kaj la parizanon Frédéric Passy, la grandan pioniron de la internacia arbitrado. En tiu epoko Frédéric Passy estis multe pli konata, ol Henry Dunant. Nu estas la inverso.

Cl.- En verko titolita ***Pour la Paix, notes et documents*** (*Por la Paco, notoj kaj dokumentoj*), Frédéric Passy publikigis tri jarojn antaŭ sia morto interesajn sciigojn pri sia avangarda laboro. Estas tiu laboro por la paco, kiun fakte rekompencis, kaj tio tute prave, la Nobel-packomitato.

A.- Ni opinias, ke la solula kuraĝo kaj la porpaca luktado de Frédéric Passy meritas pli ol kelkminuta raporto. Pro la nura interveno de Frédéric Passy pluraj internaciaj konfliktoj povis solviĝi per arbitrado, anstataŭ disvolviĝi laŭ la tradiciaj perfortaj kutimoj. Pri tio la lernejoj lernolibroj pri historio ankoraŭ silentas. Oni verŝajne timas instrui al la liceanoj, ke heroismo ne nur troviĝas inter la militantoj. Ĉar oni ne instruas pri la kaŭzoj de la militoj, ne estas interese raporti pri militontoj, kiuj decidis sin submeti al la arbitrado de neŭtrala registaro pro la interveno de homo, kiu klamas la veron, kaj dank'al la apogo de kuraĝaj ĵurnalistoj.

Cl.- Kiam oni ekzamenas la disvolviĝon de la internacia arbitrado, oni akiras la certecon, ke Frédéric Passy dum tuta generacio estis la motoro de opini-movado, kiu devigis la registarojn pli kaj pli rezigni je perforto por siaj interrilatoj. Ligo de Nacioj, kiu estis fondita tuj post la unua mondmilito, estas grandparte unu el la pozitivaj rezultoj de la nelacigebla porpaca luktado de Frédéric Passy.

A.- Frédéric Passy mortis naŭdekjaraĝa en 1912, do ekzakte du jarojn antaŭ la mondmilito, kiun li antaŭvidis, kaj kontraŭ kiu li konstante intervenis.

Cl.- Pri la vivo mem de Frédéric Passy oni ne multon scias. Tion mem volis li. Li skribis antaŭparole al la libro *Por la Paco* : « *Ofte oni petegis min skribi miajn memoraĵojn ; tion mi ĉiam rifuzis fari. Mi ne opinias, ke mia vivo [...] havas sufiĉan gravecon por esti rakontinda al la nunaj kaj estontaj generacioj. Mi ne multe ŝatas, tion mi agnoskas, tiujn plimalpli beletrajn monumentojn, kiujn, sub la nomo biografio aŭ konfesoj, oni starigas al si dum la propra vivo.* »

A.- Tamen en tiu libro *Por la Paco* Frédéric Passy sentas la neceson raporti pri propraj agoj. Li sentis la bezonon malsilenti, dum li ankoraŭ havis precizan memoron, pri la faktoj ; li publikigis dokumentojn, kiuj malhelpas kontraŭdirojn kaj dubojn, por ke estu lumo, ĉar mallumon koncerne la porpacan luktadon kaj la disvolviĝon de la internacia arbitrado komencis sisteme fari la naciistaj historiistoj.

Cl.- *Por la Paco* ne nur estas riĉe dokumentita raporto, ankaŭ ĝi estas humurplena anekdotaro, kies legado estas sufiĉe pasiiga. Tiu libro certe respegulas la talenton de Frédéric Passy, tiu prelegisto, ĵurnalisto kaj publicisto, kiu kapablas reteni la atenton de la aŭdantaro aŭ legantaro, eĉ kiam la temoj en si mem ne estas tre altiraj.

A.- Frédéric Passy naskiĝis en Parizo en 1822 en riĉa burĝa familio. Li studis ekonomion kaj famiĝis en tiu fako pro prelegaro prononcita en la vintro 1860-61 en la Universitato de Montpellier. La ekonomia literaturo ŝuldas al li plurajn studojn kaj eseojn. Ni menciuj kelkajn titolojn : *Lecionoj de politika ekonomio* ; *Malthus kaj lia doktrino* ; *La Historio de la Laboro* ; *Solidareco de la Kapitalo kaj de la Laboro*.

Cl.- Sed fakte Frédéric Passy iom post iom forlasis sian instruadon de politika ekonomio favore al la porpaca laboro. Jen la kaŭzo. En 1867 Prusio kaj Francio troviĝis en militpretiĝo pro konflikto, kies kaŭzo aŭ preteksto estis Duklando Luksemburgio. Frédéric Passy sendis leteron al la gazeto *Le Temps*, la antaŭulo de *Le Monde*. Ĝi estis alvoko al la prusa kaj franca imperiestroj por internacia arbitrado kaj kontraŭ tiuj milit-minacoj. Post hezito la gazeto *Le Temps* aperigis la leteron. Ĝia efiko estis tuja. Alfluis el ambaŭ landoj apogaj leteroj. Prusio, Francio kaj Luksemburgio devis submeti sian konflikton al arbitrado. Por la unua fojo en la historio oni ĉeestas similan evoluon : solulo povis devigi imperiestrojn militemajn ne nur rezigni pri batal-gloro, sed, kio estas multe pli grave, sin submeti al la juĝo de neŭtrala potenco.

A.- De nun Frédéric Passy estos la apostolo de la paco. Ĉion li dediĉos al tiu kaŭzo: la familian trankvilon, la profesion, la propran havaĵon. De tiam li estas la advokato de la internacia arbitrado ĉe ĉiuj registaroj, kiuj ne respektas siajn pac-kontraktojn kaj paktojn. Kaj pli ol unu fojo li sukcesos revenigi hejmen batalontojn. Ĉu tio ne estas pli rakontinda, ol la faroj de la krimuloj, kiuj kondukas tutajn popolojn al amasbuĉado ? Ho, ne ĉiam li sukcesos. Tri jarojn post 1867 la prusa kaj franca imperiestroj tamen interbatalos. La preteksto estos la trono de Hispanio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!